

Sud-Rejna Kuriero

Julio
2009

Komuna inform-bulteno de
**Esperanto-Societo Basel kaj
Mulhouse-Esperanto**

N°35

Espace 110
FR-68110 ILLZACH
CCP 19684 F Strasbourg
mulhouse.esperanto7@free.fr



Esperanto Societo Basel
Postfach 178
CH-4005 Basel
esperantobasel@gmx.ch

Karaj membroj, karaj gesamideanoj, karaj legantoj,

Jam ni atingis la somerajn monatojn, kiuj iel signas la finon de niaj kutimaj aktivecoj, sed ankaŭ samtempe novan periodon, kiu komenciĝas kun la feriaj periodoj.

Fine de majo kaj komence de junio okazis en Herzberg, la Esperantourbo, Eŭropa kaj Germana Kongresoj kaj parado tra la stratoj .

La grupo de Frajburgo invitis al amika tago kaj proponis viziton al Belchen.

Nia grupo festis la jarfinon per komuna manĝo ĉe Simone en Battenheim.

Fine de septembro okazos la aŭtuna staĝo en Marienburg/Zell. Dume vi povas ankaŭ esplori la kalendarojn de Bavelo kaj de Svisio.



Ni deziras al vi ĉiuj

André Grossmann

Agrablajn Somerajn Feriojn

- 15.07.2009 Salatvesperon ĉe la Bérourd-Focke
- 23.08.2009 Ŝipveturado al Rheinfelden
- 24.09.2009 Paroli pri la ferioj
- 22.10.2020 Legado - legaĵoj
- 26.11.2009 Programo
- 19.12.2009 Zamenhofa festo 2009 en Frajburgo

Nicole Bérourd

Poŝamiko

Jen agrabla libreto, kiu trafe prezentas sur 40 paĝoj, gramatikajn resumojn, tekstetojn, kelkajn ekzercojn kaj laŭtemajn bild-vortarojn riĉe kolor-ilustritajn. La poŝforma eldonaĵo (A6) bone povas servi kiel poŝlibreto al kursanoj je komencanta kaj komencinta niveloj, aŭ kiel varbobelaj donacoj kaj propagandiloj.



La libreto kostas 6,50 eŭrojn kaj estas mendebla ĉe nia asocio, Mulhouse-Espéranto
 CCP 19684 F Strasbourg.
 A frankite: 6,50 eŭroj

Aktualigitaj informoj pri estontaj aranĝoj, fotoj pri okazintaj eventoj estas daŭre troveblaj ĉe:

<http://mulhouse.esperanto.free.fr>
<http://esperanto.alsacelorraine.neuf.fr>

Wie kann man erklären, dass die Entwicklung des Esperantos so langsam vor sich gegangen ist ?

Wenn Sie die Werke wie „Défense et illustration de la Langue française“ von Joachim du Bellay lesen, werden sie sehen, dass im XVI. Jahrhundert das Französisch sehr Mühe hatte sich als vollwertige Sprache neben dem allmächtigen Latein einen Platz zu machen. Wenn Sie die Geschichte der modernen griechischen, holländischen, tschechischen Sprache studieren, werden Sie den gleichen Widerstand der Intellektuellen gegenüber Sprachen spüren, die sie als erachtungswürdig schätzt.

Der Widerstand zum Esperanto reiht sich in die gleiche Serie ein.

Ob sie die Geschichte des Fliegens oder der Photographie studieren, so werden Sie sehen, dass die Menschheit immer zuerst starken Widerstand gegenüber Neuigkeiten leistet, die eventuell ihren Lebensstil verändern werden. Das ist ein sehr natürlicher und sehr gesunder Verteidigungsreflex.

Dazu, wie man sehen kann, wenn man die Geschichte der Vorschläge zugunsten des Esperantos beim Völkerbund betrachtet, haben die Großmächte so manövriert, um die Sprachen Zamenhofs zu torpedieren.

Hitler und Stalin haben auch alles unternommen, um es aus ihren Ländern zu verbannen.

Sie haben Riesenvorräte an Büchern verbrannt, haben den Unterricht und Gebrauch der Sprache verboten und haben zahlreiche Esperanto Anhänger ins Gefängnis geworfen.

Vergessen Sie auch nicht, dass das Esperanto nie die finanzielle Hilfe eines Staates oder einer starken Gesellschaft genoss. Es hat sich nur von Individuum zu Individuum verbreitet.

Die Esperanto-Organisationen verfügen nicht über riesige Mittel, die es braucht um Werbung zu machen. Dazu kommt, weil sich das Esperanto ganz langsam ausbreitet, handelt es sich nie, um

sensationelle Informationen, so dass die Medien sie ignorieren.

Real gesehen, wenn man die Kriege, die Wirtschaftskrisen, den Widerstand der Großmächte, die ungerechten Angriffe eines Großteils der Intellektuellen, die Verfolgungen und den Mangel an Finanzmitteln, so ist die große Ausbreitung des Esperantos in der Welt von heute ein Beweis seiner großartigen Vitalität.

Übersetzung des Textes von Claude Piron, erschienen März 1983, nachgedruckt im *Brasikfolio* aprilo-majo 2009.

BAVELO-Kalender 2009

- 26.-27.6. BAVELO-Vorstandssitzung in Villingen
5. 7. Esperanto-Stand bei *Vereine stellen sich vor*, Stadthalle Offenburg - E.Sester
11.7. Esperanto-Monatstreffen Stuttgart
18.-25.7. Ökumenischer Kongress (EEK) in Wroclaw, Polen
18.-25.7. IJK in Liberec, Tschechien
18.-25.7. SAT-kongreso, Milano
25.7.-1.8. Universala Kongreso, Bialistoko
2.-8. 8. MIRO in Čakovec, Kroatien (anstelle des ungarischen IJS)
19. 9. **BAVELO-Wanderung** mit Engelbert Sester (Treffpunkt: Bahnhof Offenburg)
11.-12.9. BAVELO-Vorstandssitzung in Aalen
12.9. Esperanto-Monatstreffen von Stuttgart in Aalen, Besuch der Reichsstädter Tage, mit Gottesdienst
25.-27.9. **MES - Mozellanda Esperanto-Semajnfino** auf der Marienburg bei Zell an der Mosel (mit BAVELO-Beteiligung)
kaj staĝo de Esperanto France-Est (programo kaj aliĝilo en ĉi-tiu bulteno).
2.-4.10. TORPEDO-Lehrertreffen in Herzberg am Harz
10.10. Esperanto-Monatstreffen Stuttgart – Ausflug nach Strasbourg mit Stadtbesichtigung per Schiff - auf Esperanto! - und Besuch bei TV-Sender ARTE
30.10.-1.11. Verbandsrats-Sitzung in Herzberg im Harz
6.11. Zamenhoffeier in VS (Villingen-Schwenningen)
6.-8.11. Bavelido-Jahrestreffen in VS mit Jahreshauptversammlung (8.11.)
7.11. BAVELO-Vorstandssitzung in Villingen-Schwenningen
14.11. Esperanto-Monatstreffen in Stuttgart mit **Vikipedio-Seminar** (10-16 Uhr) und Gottesdienst in St. Georg um 16 Uhr
13.12. Zamenhoffeier Stuttgart
29.12.-3.1. Silvesterveranstaltungen: IF (Nördlingen), NR, JES (IS+AS in Zakopane, Polen)

Svisa Esperanto-Kalendaro 2009 julio ĝis septembro

<u>Kiam - Quand - Wann ?</u>	<u>Kio - Quoi - Was ?</u>	<u>Kie - Où - Wo ?</u>
1-an de julio, merkredon, 19.00	Esperanto-Klubo Wil: Tradicia vizito de la turo de Wil	Turo de Wil (Wil SG)
17-an de julio, vendredon, 14.00-19.00	Elektromagnetischer Sommer mit Radio-Lora und der Esperanto-Gesellschaft Zürich	Kunsthof Zürich und auf Radio Lora 97,5 MHz
18-an ĝis 25-an de julio 2009	66-a Internacia Junulara Kongreso de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO)	Liberec, Ĉekio
25-an de julio ĝis 1-an de aŭgusto 2009	94-a Universala Kongreso de Esperanto	Bjalistoko, Pollando. Informojn sub www.uea.org
30-an de julio 2009, ĵaŭdon, 20.30	Libera kunveno de Esperanto-Societo Zuriko	c/o Michael Roesser, Weinbergstrasse 137, CH-8006 Zürich
7-an de aŭgusto 2009, ĵaŭdon	Lucerna Esperanto-Societo: Vespera Promenado kun Kony Rey	Lucerno, Tel. 041 210 25 88
16-an de aŭgusto 2009, dimanĉon	Esperanto-Klubo Wil: Tuttaga ekskurso al Vinterturo	Wil/Vinterturo
22-an de aŭgusto 2009, sabaton	Studaranĝo en CDELI La Chaux-de-Fonds: Mireille Grosjean: „Mia vojaĝo en Benino“	Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds
23-an de aŭgusto 2009, dimanĉon	Esperanto-Societo Basel invitas al ŝipveturado sur la Rejno	Esperanto-Societo Basel, Tel +49 (0) 76 214 57 12
27-an de aŭgusto 2009, ĵaŭdon, 20.30	Libera kunveno de Esperanto-Societo Zuriko	c/o Michael Roesser, Weinbergstrasse 137, CH-8006 Zürich
3-an de septembro 2009, merkredon, 14.00-16.00	Lucerna Esperanto-Societo invitas al: Konversacia rondo kun Sonja Brun	Restoracio Bellini (Hotelo Continental-Park), Murbacherstr. 4, 6000 Lucerno Tel. +41(0)41 228 90 50
5-an de septembro 2009, sabaton	Kultura festo honore al L.L. Zamenhof, naskiĝinta antaŭ 150 jaroj	Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds
24-an de septembro 2009, ĵaŭdon, 20.30	Libera kunveno de Esperanto-Societo Zuriko	c/o Michael Roesser, Weinbergstrasse 137, CH-8006 Zürich
24-an de septembro 2009, ĵaŭdon, 20.30	Eŭropa Tago de la Lingvoj / Europäischer Tag der Sprachen – Öffentliche Veranstaltung	Zentrum Karl der Grosse, Kirchgasse 14 8001 Zürich

EŬROPA ESPERANTO-KONGRESOJ EN HERZBERG LA ESPERANTO-URBO



La organiza teamo

Fine de majo kaj komence de junio 2009 la Esperanto-urbo Herzberg am Harz gastigis samtempe du kongresojn. Nome la 8-an Eŭropan Esperanto-Kongreson kaj la 86-an Germanan Esperanto-Kongreson. La eventon partoprenis pli ol 350 geesperantistoj kaj centoj da artistoj kaj gastoj inter kiuj grupo da gelernantoj el la pola ĝemelurbo Góra. Krome, en tiu momento en Herzberg okazis la urba festo al



kiu la esperantistoj estis invititaj. Dum la solena inaŭguro muzikis la loka gimnazia grupo. Krom oficialaj gastoj la kongreson salutis kaj sukceson deziris la urbestro Gerhard Walter, kiu jam parolas Esperanton. Pola delegacio invitis al la ĉi-jara UK okazonta en Bjalistoko, la naskiĝurbo de Zamenhof.



Ĉe la Esperanto-vendejo pri Ginsengo



La kastelo de Herzberg



La programo estis tre ampleksa. Okazis multaj laborkunsidoj, prelegoj, lumbildaj prezentoj pri Japanio, Koreio, Kubo, amuzaj skeĉoj, informo pri AIS, seminarioj, Esperanto-ekzamenoj kaj ĉiuvespere abunda kultura kaj distra programo. Por invitataj gastoj estis akcepto kun ŝaumvino. La gejunuloj havis apartan programon en la junulara domo, al kiu ili ankaŭ invitis nin. Dum la unua vespero ni aŭskultis kantojn en greka kaj Esperanto lingvoj. El Hamburgo venis la fama kantisto Ralph Glomp, el Pollando Georgo Hanzlik, pupteatran prezenton pri barono "Münchhausen" ofertis Christoph Frank, folkora grupo el apuda vilaĝo Pohlde



El Latvio



Antaŭ la parado

El Pollando

prezentis popolajn dancojn, la hungara parlamenta koruso kantis por ni hungare, polaj gejunuloj prezentis varian dancspektaklon. En la urbodomo dum la ĉeesto de la urbestro estis prezentita la ĵus naskiĝinta himno por la kongreso fare de Kees Ruig el Nederlando. En la urba biblioteko estis instalita Esperanto-ekspozicio de privata kolektanto pri diversaj esperantaĵoj, sed ĉefe pri filatelio. Oni povis admiri rarajn leterojn,



kompletan E-poŝtmark-kolekton kaj multajn fotojn pri diversaj E-aranĝoj. Ankaŭ en la urba kastelo eblis vidi ekspozicion pri Esperanto kaj la kastelan muzeon. Apartan intereson havis speciala poŝt-stampo pri la E-kongreso. Ne mankis informoj pri saniga efiko de ginsengo kaj multaj vizitis ginsengan vendejon kiun en Herzberg prizorgas Song

Jeong-ok kun sia edzo Harald Schicke. Harald ankaŭ parolis pri sia vojaĝo al Norda Koreio kaj gvidis bierseminaron. Kelkaj restoracioj havis menuo-kartojn en Esperanto kaj iuj ofertis manĝaĵojn speciale faritajn por esperantistoj.

La plej granda kaj impona aranĝo estis la urba festo dum kiu diversaj grupoj feste kaj folklоре vestitaj pa-

radis tra la urbo. Ĝi estis bunta kaj gaja evento. Ankaŭ esperantistoj partoprenis tiun festparadon. Bone videblis flirtanta E-flago kaj verdaj ombreloj kun surskribo Esperanto. Pluraj el ni portis sur si flagon tiel markante de kiuj landoj ili venis. Ni estis multnombraj. Kantante kaj salutante la rigardantojn laŭvoje ni vekis intereson. Centoj da homoj eksciis pri Esperanto, eĉ aŭtomobilistoj devis atendi



Esperantistoj paradas tra la stratoj de Herzberg



Specifaj menuoj en iuj restoracioj



en longa vico dum nia marŝado sur la ĉefvojo. Por Herzberg ĝi estis sendube la plej granda Esperanto-evento iam ajn okazinta tie.

Dum la kongreso eblis partopreni plurajn ekskursojn urbajn kaj eksterurbajn. En la urbo Goslar ni admiris imperiestran palacon, belajn stratojn kaj la ĉefplacon.



Alia interesa ekskurso gvidis nin al la Eŭropa Rozario en la urbo "Sangerhausen", kie ni promenis inter multaj rozoj kaj aliaj floroj. Revene ni haltis ĉe grandega kaj impona monumento "Kyffhäuser". Trajne ni veturis al la urbo Braunschweig, kie ni vizitis muzeon, katedralon kaj poste ni kafumis aŭ bierumis ĉe surstrataj terasoj. La lastan tagon esperantistoj renkontiĝis en la Esperanto-centro kiun estras Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy. Ni eksciis pri Esperanto-agadoj kaj atingoj en Herzberg kaj pri bezonoj por bona disvolviĝo de Esperanto tie. Herzberg estas alloga kaj pitoreska urbo ĉirkaŭita per Harzmontaro kun multaj turismaj kaj migrad-eblecoj.



la urbestro
Gerhard Walter

Liba Gabalda

Ginsengo-vendejo en Herzberg

Tie nun ankaŭ estas ginsengo-vendejo, kiun vi povas viziti persone, por informiĝi en bona etoso pri korea ginsengo.

La ginsengo-vendejo estis inaŭgurita la 6-an de decembro 2008 je la 9a30.

Ni antaŭĝojas pri via vizito!

Tiel vi trovas nian butikon.

Informoj pri ginsengo en Esperanto estas elŝuteblaj per:

<http://www.ginseng-laden.de/downloads/ginsengo.pdf>

Kaj por mendi: <http://www.ginseng-laden.de/>



Song
Jeong-ok
antaŭ la
vendejo

Amika tago kaj migrado en la Nigra Arbaro en junio 2009 sub la suno

Sabate la 13an de junio okazis la amika tago en la Nigra Arbaro, kun samaj planoj kiel en 2007, grimpinti telfere ĝis la mont-supro de Belchen. Tiam la vetero ne estis tute favora kaj Ursula devis daŭre adapti la programon kaj eĉ rezignis pri la mont-supro de Belchen.

Sed ĉi-jare ni ĝuis vere belan veteron kaj la antaŭvidita plano plene povis realiĝi. Nia rendevuejo estis la ĉefa bazaro-placo de Staufen, kie eblis aĉetumi. Bedaŭrinde pro malfrua informado, la nombro da partoprenantoj malabundis.

Baldaŭ nia grupeto forlasis Staufen aŭtomobile por atingi nian piknikejon.

Ni veturis tra la ĉarma valo Münstertal al Münsterhalden kaj Haldenhof. Nia piknikejo estis ĉe la pura torfo-lago Nonnenmattweiher.

Paulo Finus klarigis al ni, ke tie troviĝas tute specifaj plantoj, kiujn li-mem esploris.



Malgraŭ la pureco de la akvo neniu el nia grupeto emis naĝi.

Tial tuj post la manĝo ni plu-veturis tra Schönau al Belchen, la kulmino de la Nigra Arbaro je 1414 m.



Tie, dank'al telfero-stacio eblis atingi la supron en malpli ol 5 minutoj. Malgraŭ tio, iuj kuraĝuloj preferis migradi ĝis la supro.



Tiam supre etendiĝis antaŭ niaj okuloj vasta pejzaĝo, valoj, arbaroj (eble nigraj) kaj ankaŭ la Rejno kaj la kanalo apude, supozeble en la regiono de Neuf-Brisach.

Ni ĉirkaŭ-promenis la rondan mont-supron, daŭre ĝuante vastan panoramon. La iama revo de Ursula en 2007, finfine realiĝis. Montri al la amikoj la mirindecon de Belchen.



La tago finiĝis per lasta pikniko ĉe la parkejo. Rapide starigita tablo subite pleniĝis per kukoj, kafoj, ĉerizoj por plezurigi ĉiujn kaj danki la organizantojn.

Raportas Andreo, Fotoj Andreo kaj Ginette

Jarfina fest-manĝo en Battenheim ĉe Simone Kiry

Jam en aprilo mi metis la demandojn al niaj membroj pri nia jarfina festmanĝo: Kie? Kion? Kiam?

Mi konfesas, ke ne abundis la respondoj. Bertrand Wick ja proponis pretigi flam-tortojn, Simone Kiry refoje pretis akcepti nin en sia hejmo. Mi esploris ĉe mia frato Georges pri paelo, kion li volonte akceptis.

Laŭ tiuj informoj ni decidis pri plej oportuna dato por ĉiuj, ĉefe por la kuiristo kaj por Simone. Tiel estis decidita okazigi la feston la 26an de junio 2009.



Jam je la 17a Georges instalis sian materialon iom ekstere por pretigi paelon, kiu ja bezonas 2 horojn da kuirado.

Sur la teraso jam staris granda tablo, bele ornamita, tute preta por akcepti la gastojn. Tie estis agrable servi la aperitivon al alvenantaj gastoj. Amar-biero, koktel-vino Kir kaj diversaj varm-kuketoj bonvenigis ilin.

Tuj la etoso estis tre agrabla kaj simpatia. Nova lernanto, kiel Jacques Pineda povis konatiĝi kun la ceteraj grupanoj kaj ĝui la Esperanto-etoson.



Dume, nia kuiristo Georges daŭre aktivis por prepari la paelon.

Ekestis la demando, ĉu ni daŭrigu la manĝon sur la teraso aŭ en la manĝo-ĉambro, kie fakte Simone jam bele pretigis tablon por ĉiuj gastoj.

La plimulto preferis manĝi interne, eble pro timo de pluvo ekstere aŭ pro la alloga tablo en la salono.

Georges povis prezenti al la gastoj la grandan paton, en kiu li majstre kuiris la paelon.

Jen apetitiva kaj fotinda pato. Baldaŭ eblis servi la gastojn, dume ĉe la tablo Roberto zorgis pri la vinoj.



Post paelo venis diversaj fromaĝoj kaj fine ankaŭ 2 glaciaĵo-kukoj kiel deserto.

Tiel finiĝis nia vespero per kafo aŭ teo. Tamen ĝi ne plene finiĝis ĉar.....



Ĉe la fino Simone iom surprize alportis plian kukon kun la surskribo "Esperanto". Plej surpriziĝis Roberto.

Certe necesis danki al Simone, kiu refoje akceptis nin en sia hejmo kaj al Georges, kiu tiom lerte pretigis la manĝon, kaj al ĉiuj, kiuj iel kontribuis al la sukceso de tiu vespero.



Kvina **Mozellanda Esperanto Semajfino (MES)** sur Marienburg
apud Zell/Mosel en Rejnlando-Palatinato
25a/27a de septembro 2009

en kunlaboro kun Luksemburga Esperanto-Asocio (LEA),
Baden-Virtembergga Esperanto-Ligo (BAVELO) kaj

66a regiona staĝo de



Kursoj kaj laborgrupoj:

Kurso A por komencantoj (Martin Brüggeleier)

Kurso B por komencintoj (Edmilson Lima Serejo el Brazilo)

Kurso D diversaj prelegoj

Prezoj:

Partopren-kotizo

por la semajfino: 35 €

por eksterlandanoj aŭ GEA-membroj:
25 €

Por gejunuloj malpli ol 27 jaroj: 10 €

GEJ-membroj kaj junuloj el ekster-
lando: 0€

Parta-tempuloj pagu la plenan kotizon.

Tranoktoj kun kompleta pensio:

60€, por du noktoj (du matenmanĝoj,
du tagmanĝoj kaj du vespermanĝoj)

Rabato por gejunuloj kaj familioj kun
infanoj laŭ niaj financaj ebloj.

Unuopaj manĝoj:

tag- aŭ vespermanĝo: 10€

Bonvolu pagi surloke kontante!

Programo:

Vendredo, la 25an de septembro 2009

18a00 vespermanĝo

19a00 interkona vespero

Sabato, la 26an de septembro 2009

9a00 – 12a30 diversaj kursoj

12a30 tagmanĝo

14a00 ekskurso al la bierfarejo *Kloster
Machern* apud *Zeltingen*

18a00 vespermanĝo

19a00 diservo en Esperanto

20a15 vespera programo: bierseminario
el la lando de la 1500-bieroj de
Marc Vanden Bempt el Loveno

Dimanĉo, la 27an de septembro 2009

9a00 prelego "Kiel paroligi lernantojn
uzante lernolibron?" de Josef Schiffer

12a30 tagmanĝo

14a00 fino de la staĝo

La staĝejo estas iama kastelo nomata „Marienburg“ sur monteto en la valo de la rivero Moselo. La klerigejo situas en meandro de la rivero. Oni vidas la riveron je du flankaj de Marienburg. La plej proksimaj urboj estas Treviero (Trier) kaj Koblenco (Koblenz). Marienburg apartenas al la urbeto Zell, kiu proksimas al Wittlich. Eblas vojaĝi tien per trajno. La stacidomo Bullay estas ĉe la fervoja linio inter Treviro kaj Koblenco. De Bullay eblas promeni (3 km) al Marienburg. Ni ofertas transportoservon de tie. Bonvolu anonci kiuĥore vi alvenos en Bullay.

Aliĝilo por la 66a Regiona Staĝo de Esperanto en Marienburg apud Zell/Mosel en Rejnlando- Palatinato la 25/26/27ajn de septembro 2009

S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo	Aĝo, malpli ol 18	Elektita kurso	Vegeta- rano
1					
2					
3					
4					
adreso					
telefono:			ret-adreso:		
Nenia antaŭ-pago estas petata de la organizantoj, tial vi povas rekte sendi vian aliĝilon al la jena adreso:					
Esperanto Rheinland-Pfalz p.a. Wolfgang Bohr Johannes-Kirschweg-Str. 11 DE-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler Germanio telefono: 0049(0)2641/4885 ret-adreso: wolfgang.bohr@esperanto.de					

R
e
z
e
r
v
a
d
o

Nombro da manĝoj aŭ tranoktadoj	Vendrede	Sabate	Dimanĉe
Tag-manĝo			
Vesper-manĝo			
Tranoktado + Maten-manĝo			

Miaj preferoj	
	1-lita ĉambro
	2-lita ĉambro
	plur-lita ĉambro

Dato	subskribo
-------------	------------------

Artikolo en L'Alsace de la 13.05.2009

Le mouvement Europe Démocratie Espéranto présente des listes en France et une en Allemagne.

Son objectif : faire connaître la « langue de la paix ».

Présentée la semaine dernière lors d'une conférence de presse à Strasbourg, la campagne pour les élections européennes d'Europe Démocratie Espéranto (EDE) veut promouvoir cette langue dans l'Union européenne. « *L'objectif est d'avoir une langue de travail qui permette les débats* », explique Cyrille Hurstel, chargé des relations extérieures pour la France.

Déjà présent lors des dernières élections européennes où il avait récolté 25 000 voix en France, le mouvement espère mieux faire connaître l'espéranto, forgée par le docteur Zamenhof en 1887 à Varsovie. Huit listes sont présentées en France et une en Allemagne menée par Reinhard Selten, prix Nobel d'économie.

« Sur un pied d'égalité »

« *Nous sommes capables, grâce à notre nature transfrontalière, de faire parler et de faire discuter tous les citoyens de l'Union européenne, pas seulement sur des thèmes nationaux, mais aussi sur des thèmes vraiment européens* », explique le Strasbourgeois Fabien Tschudy, animateur scientifique de 26 ans et tête de liste pour l'Est.

« *Pour construire une union politique et économique, il faut que nous soyons sur un pied d'égalité* », estime Isabel Castro. « *Or l'effet pervers du "tout anglais" dans les relations internationales est de toujours privilégier les anglophones* ».

Des soutiens à droite et à gauche

Un problème qui se pose aussi dans le domaine de la publication des recherches scientifiques, selon Cyrille Hurstel. Hormis la volonté de poser l'espéranto, surnommée « *la langue de la paix* », comme un moyen de communication, l'EDE n'a pas de projet politique précis. « *L'espéranto fait partie des thèmes de la liste Europe Écologie, mais nous avons des soutiens à droite comme à gauche* », souligne Fabien Tschudy.



Elections Européennes 2009 dans le Grand Est

Résultats de EDE

Europe Démocratie Espéranto

	En 2009		En 2004	
	Nombre de voix EDE	% des votes exprimés	Nombre de voix pour EDE	% des votes exprimés
Grand Est	4325	0,20 %	5336	0,24 %
Alsace	1430	0,31 %	1384	0,31 %
Franche-Comté	537	0,16 %	995	0,29 %
Lorraine	1099	0,19 %	858	0,14 %
Champagne-Ardenne	583	0,18 %	871	0,24 %
Bourgogne	676	0,15 %	1228	0,26 %
Départements				
Haut-Rhin	506	0,27 %	571	0,31 %
Bas-Rhin	924	0,33 %	813	0,31 %
Territoire de Belfort	48	0,14 %	129	0,34 %
Doubs	240	0,17 %	400	0,27 %
Haute-Saône	113	0,15 %	226	0,29 %
Jura	136	0,18 %		
Grandes Villes				
Mulhouse	96	0,58 %	35	0,19 %
Colmar	33	0,23 %	42	0,28 %
Strasbourg	158	0,29 %	160	0,30 %
Belfort	11	0,12 %	28	0,27 %
Montbéliard	13	0,25 %	11	0,18 %
Besançon	42	0,16 %	75	0,28 %
Vesoul	9	0,24 %	12	0,28 %
Lure	3	0,18 %	3	0,16 %
Héricourt	4	0,15 %	3	0,11 %
Luxeuil	3	0,16 %		

KIU REGIS EN EŬROPO ?

Ĉu estas ebla, ke en la Eŭropo iam estus reginta la nigruloj ? En la periodo de meza neolito ĉirkaŭ 5 000 ĝis 4 500 jaroj antaŭ nia epoko okazis en okcidenta kaj suda Eŭropo surprizaj eventoj : la grupoj loĝantaj re-ciproke en tre malproksimaj teritorioj komencis neatendite konstruadi el gigantaj rok-blokoj. La megalitoj aperis eĉ sur la teritorio de meza kaj norda Eŭropo. Tiu ĉi ideo povis naskiĝi en norda Afriko. La reprezentantoj de megalita kulturo ekde tie venis sur la Ibera duoninsulo, sur la landlimoj de Hispanio kaj Portugalio ili komencis minadi la oron kaj kupron. Ili venis en Bretonion, sur Britajn insulojn kaj ĝis la Balto. La elira bazo restis Hispanio, sed la centro de kulturo estis sur Malto. En la vulkanaj rokoj de tiu ĉi insulo ili kavigis subterajn komplekson de sanktejojn, kiuj ĝis nun vekas miregon. Ĉie, kien ili venis, ili subigis al si la lokajn gentojn, kaj devigis ilin konstruadi ekster-normajn konstruaĵojn. Kiel ekzemplo de la megalitaj konstruaĵoj estas la ŝtonaj cirkloj Stonehenge kaj Salisburio en Anglio, Ales Stenar en Svedio, Wensiryo en Pollando. Ili estis starigitaj el la rok-blokoj, kiuj pezis kelke da tunoj kaj servis al astronomiaj observadoj kaj al religiaj ceremonioj. Tien oni alportadis la oferaĵojn. La cirklojn povas akompani vicoj da menhiroj, aleoj de ŝtonaj kolonoj treniĝantaj foje centojn da metroj.



Aliaj estas la dolmenoj, « la tabloj de gigantoj », potencaj ŝtonaj platoj apogiĝantaj je kelkaj pli malgrandaj rokoj.

La kaŝemaj montetoj de Francio aŭ Danlando kaŝas tutajn laborintojn de tuneloj kun vandoj el ŝtonaj platoj, kien ili entombigadis la estrojn, ŝamanojn kaj versimile eĉ la pastrojn de misteraj kultoj. En multaj menhiroj en Francio estis trovitaj (malkaŝitaj) gravuritaj enigmaj spiraloj kaj ondiĝantaj linioj. La vizioj (imagoj) de kirliĝantaj spiraloj kaj ondoj estas tipaj statoj post uzo de LSD. Eblas, ke la alvenintaj ĉi tien alportis ekkonon, kiel preparadi la halucigenajn vaporaĵojn. Aŭ, ĉu la narkomaniaj vizioj estis bazo substanco de la mistera kulto ? Post la morto oni entombigis la korpon de la estro en traplugitan grundon. Tiu ĉi kutimo diferenciĝis ekde la lokaj moroj, la reprezentantoj de eŭropa kulturo enterigadis la mortintojn en embria pozicio.

El Spirit Trad. Jaci

KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2009-2011

Al Mulhouse Esperanto

Ĉi-tiu numero estas jam la dua numero de la abon-jaro 2009. Se vi ankoraŭ ne renovigis vian kotizon aŭ abonon bonvolu tion fari tre baldaŭ. Jen ĉi-sube la kotizoj por la 3 venontaj jaroj.

Ni invitas vin ilin pagi kiel eble plej baldaŭ.

Membrigo kun abono al bulteno Sud-Rejna Kuriero

2009	6,00 eŭroj
2010	6,00 eŭroj
2011	6,00 eŭroj

Pagebla al André Grossmann, 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM
Ĉekojn je la nomo de: Mulhouse-Esperanto CCP 19684 F Strasbourg.



Kun malĝojo ni eksciis, ke la 11an de junio 2009 forpasis s-ino Héléne Damotte. La funebra ceremonio okazis la 14an de junio. Bedaŭrinde tiam neniu el niaj membroj estis informita. Intertempe ni sendis al la familio niajn sincerajn kondolencojn je la nomo de Mulhouse-Espéranto.

S-ino Damotte aktive subtenis niajn agadojn en la jaroj 1990 kaj ebligis al ni kunveni en ŝia propra hejmo.

Krome ŝi instigis nian grupon iĝi oficiala asocio. Tiel ekŝtis nia asocio Mulhouse-Espéranto. Ni estu plene dankaj al ŝi.

Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare. Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim. Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.

Aliaj fotoj pri la Kongreso en Troyes

